

# Esperanto-Brno

*Esperanto-Brno - Kluba prelego 25.4.2012*

## Lando, kiu neestante estas

*Oldřich Arnošt Fischer*

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, la 25-an de aprilo 2012

### Fama prelego pri Moravio kaj moravia himno

Moravia poeto *Jan Škácel* [ska:cel] (1922 - 1989) estis invitita en la jaro 1988 en Slovenion, por ke ricevu premion de slovenian verkistoj por mezeŭropa literaturo. Li estis malsana, suferis de pulmona emfizemo kaj lia vivo estis endanĝerita de vojaĝado. Malgraŭe siajn malfacilaĵoj li alvenis en slovenian vilaĝon *Lipica*. Li estis solene premiigita en kaverno *Vilenica* [vilenjica], sed jam ne kapablis partopreni en gazetara konferenco kaj plej ofte kuŝis en sia ĉambro. La 9-an de septembro 1988 li ekparolis en konferenco pri mezeŭropa identeco:

„Moravio estas mirinda lando jam tial, ke ĝi estas kaj tamen ne estas. Ĝi iam estadis markgraflando, kiu estis libere kunigita al Bohemia Regno. Hodiaŭ ĝi kunfluis kun Ĉeĥa Federacia Respubliko kaj ĝia nomo troviĝas nur en tutŝtataj veterprognozoj kaj popolaj kantoj. Kaj moraviaj popolaj kantoj estas belegaj. Sen ili, sen ilia iomete kruda beleco, ne estus mondfama komponisto *Leoš Janáček* [leoŝ jana:ĉek], kiu naskiĝis kaj travivis tutan sian vivon en Moravio.

La moraviaj kantoj temas pri aŭ fidela aŭ malfidela amo, bataloj kontraŭ turkoj, akvofluoj, hirundoj, popolaj ribeluloj, aŭ selitaj aŭ neselitaj ĉevaloj, pri knabo, kiun oni mortigis en arbaro. Vortoj de tiuj kantoj estas kiel faritaj de oro kaj iliaj melodioj estas arĝentaj. Tio estas arĝento de herboj stipoj, kiuj estas kombitaj de orientaj ventoj, ĉar tiu lando estas aperta al oriento, de kiu eĉ en Moravion eniĝis tataraj rabistaroj kaj volis eniri turkaj militaj taĉmentoj. Ne senkaŭze oni en Moravio nomiĝas maizon „turkyně“ [turkinje]. (**Bildo 1**)

En Moravio ni parolas ĉeĥe, sed moraviamaniere. Eksterlandanoj povas miri pri tio, sed tio estas vero. Estas Moravio, sed ne estas moravianoj, estas moravianoj, sed ne estas Moravio. Kiel oni povas akcepti tiujn antagonismajn deklarojn, kiel oni povas bone ilin ekspliki? Francisko *Palacký* [palacki:], kleriganto de la popolo, sciencisto kaj aŭtoro de enhavoriĉaj libroj pri historio de sia nacio, kiujn li verkis uzante majestatan lingvon, ekdeklaris pri si mem: „Mi estas ĉeĥo apartenanta al moravia genro.“

Tio respondas al realeco kaj tiras la medolon.

Tio signifas, ke Moravio samtempe estas neestante kaj ne estas estante. Kaj ĝi precipe estas ĉarma. Tion pensas pri ĝi ni ĉiuj, kiuj estas moravianoj kaj samtempe ĉeĥoj. Ĉeĥoj perlingve, moravianoj perkore.

Kaj ni havas nehavante ankaŭ ion, nome himnon. La himno de Ĉeĥoslovaka Respubliko konsistas de du kantoj, kiujn oni kantas unu post alia. La unua kanto estas ĉeĥlingva, la dua kanto estas slovaklingva. Inter ili estas paŭzeto, nur ĉirkaŭ du aŭ tri sekundoj, sed ne pli longa. Tiu laŭŝajne sensignifa momento de silento estas moravia himno. Ni fanfaronas de tiu himno opiniante fiere kaj kun certa bonhumuro, ke ni havas la plej belan himnon de tuta mondo. La silenton. La silenton, kiu estas nuntempe tre rara, la silenton, kiu estas majestata kaj samtempe modesta, la silenton sen vortoj, kiuj altigus nin super aliaj nacioj, la silenton, kiu ne mensogas, la silenton, dum kiu ni pensas pri nia Moravio.

Pri tiu neordinara bona lando, kiu ne estas, sed tamen estas.“

*Jan Skácel*, kiu jam nur el sia malsanuleja lito povis rigardi falojn de socialismaj reĝimoj en Germanio kaj Pollando, esperis, ke ankaŭ Ĉeĥoslovakio ekliberiĝos de socialismo. Bedaŭrinde li forpasis la 7-an de novembro 1989, nur 10 tagoj antaŭ plenumo de sia sonĝo.

### **Granda Moravio, antikva mezeŭropa kristana slava ŝtato (833 – 906)**

Rusa kronikisto *Nestor* verkis sian faman kronikon en la 12-a jarcento. Pri moravianoj li informis: „... slavoj alvenis, eklokiĝis sur bordoj de la rivero Moravio kaj nomiĝis moravianoj ...“.

Pri Granda Moravio oni oficiale scias ekde la jaro 833, kiam kristana princo *Mojmír I* [mojmi:r] ekziligis paganan princon *Pribina*-n el princojo de *Nitra* [njitra], sed tiu slava mezeŭropa ŝtato verŝajne estiĝis pli frue. Super Granda Moravio regadis kvar moraviaj princoj: *Mojmír I* (833 – 846), *Rostislav* [rostjislav] (846 – 870), *Svatopluk* (871 – 894) kaj *Mojmír II* (894 – 906). Granda Moravio estis vere granda. Dum regado de princo *Svatopluk* ĝi estis eĉ pli granda ol nuntempa Ĉeĥa Respubliko. Norda limo situis norde de polaj urboj *Glogów* [gloguv], *Wrocław* [vrocuav] kaj *Kraków* [krakuv], suda limo en nuntempaj hungaraj urboj *Balatonszentgyörgy* [balatonsentdjerdj], *Veszprém* [vespre:m] kaj *Székesfehérvár* [se:keŝfehe:rva:r]. En la jaro 902 princo *Mojmír II* venkis hungarojn en batalo apud (nuntempa) Bratislavo, sed verŝajne ekde la jaro 906 jam Granda Moravio ne plu ekzistis.

Granda Moravio malaperis, sed moravianoj, antikva mezeŭropa kristana nacio, restis.

### **Moravia Margraflando**

En la jaro 1182 princo *Konrad II Oto* de *Znojmo* unuigis Moravion kaj dum intertraktadoj kun roma imperiestro *Frederiko Barbarossa* akiris, ke Moravia fariĝis margraflando. Ĉeĥa armeo subgvide Primislido, kiu poste fariĝis bohemia reĝo Primislo *Otakar I*, batalis kontraŭ moravianoj (*Konrad II Oto* de *Znojmo*) en batalo apud *Loděnice* [lodjenjice] la 10-an de decembro 1185, sed lia armeo devis post la batalo forlasi Moravion. Moravia Margraflando sukcese defendis sian liberecon kontraŭ ĉeĥoj. En la jaro 1186 bohemia princo kun moravia margrafo repaciĝis, sed historio de Moravio ĉiam iomete diversis de historio de Bohemio.

Mezepokaj nobeloj, kiuj regadis en Moravio ofte ne parolis ĉeĥe. Ili estis moravianoj nur laŭ ilia posedado de moravia teritorio. Karolo pli Aĝa de *Žerotín* [ĵerotji:n], fama moraviana politikisto, ankaŭ estis teritoria moraviano. *Jan Ámos Komenský* [a:mos komenski:] subskribis sin inter alia ankaŭ „*Moravius*“ („Moraviana“). En la 16-a jarcento Bohemio kaj Moravio malproksimiĝis. Ekzemple Bartolomeo *Paprocký* [paprocki:] de *Hloholy* [hlohohli] en sia libro „*Spegulo de fama Moravia Margraflando*“ ne nur priskribis moravian blazonon kun aglino, sed ankaŭ rifuzis legendon, ke moravianojn gvidis Prapatro Ĉeĥo.

### **Moravianoj ne malaperis**

Eĉ Habsburgoj respektis Moravian Margraflandon. Kiam imperiestro Ferdinando II Habsburga post batalo apud Blanka Monto (1620) enkondukis sian Restitutan Landordon, kiu estis celita kontraŭ nekatolikoj, tiu landordo ekvalidis en Bohemio ekde la 10-an de majo 1627, sed en Moravio eĉ post unu jaro, la 10-an de majo 1628. Tial ekzemple moravia politikisto Karolo pli Aĝa de *Žerotín* povis protekti en siaj moraviaj rezidejoj nekatolikojn kaj materiale subteni *Komenský*-n kaj aliajn persekutitajn homojn.

Dum la 16-18-an jarcentoj malaperis el Moravio multe da indiĝenaj nobeloj, kiuj estis anstataŭitaj de eksterlandanoj. Ekzemple palacon en *Lednice* [lednjice] proprietas germane parolanta familio *Liechtenstein* [li:htenŝtajn], palacon en *Náměšť* [na:mnjeŝtj] super *Oslava* germane parolanta familio *Haugwitz* [haŭkvic], kaj palacon en *Letovice* hungare parolanta familio *Kálnoky* [kálnoki]. Nobeloj ofte parolis fremdlingve. Sed vilaĝanoj loĝintaj en Moravio parolis moravie kaj ĉiam sciis, ke ili estas moravianoj. Kiam slovaka poeto *Jozef Hurban* en la jaro 1839 vizitis Moravion, unu gastejmajstro en vilaĝo proksime *Brno* diris al li: „Juna sinjoro, mi kapablas paroli nek slovake nek

ĉeĥe, sed nur moravie!“ Kaj unu moravia fraŭlino informis lin: „Ho, troviĝas ĉi tie kelkaj, kiuj hontas pri moraviana lingvo, sed gealiaj nur moravie parolas.“

Landordo de Bohemia lando kaj Moravia lando ekzistis longe. Moravio havis ne nur propran sistemojn de mezuraj unitoj kaj pezaj unitoj ĝis la jaro 1756, sed ankaŭ doganan limon ĝis la jaro 1775.

Nuntempa Silezio de Ĉeĥa Respubliko estiĝis, kiam imperiestrino *Maria Terezia* perdis grandan parton de Silezio dum nesukcesaj bataloj kontraŭ prusoj (1741). Tiam Silezio estis dividita inter Aŭstrio kaj Prusio, pli poste inter Aŭstrio kaj Pollando. Nuntempe pli granda parto de Silezio situas en Pollando kaj la pli malgranda parto en Ĉeĥa Respubliko. En Pollando silezianoj havas politikajn reprezentantojn en Parlamento de Silezia Duklando (*Sejmik Województwa Śląskiego*) [vojevuctva ŝlonskjego], sed en Ĉeĥa Respubliko nek silezianoj nek moravianoj havas politikajn reprezentantojn sur nivelo de la Parlamento.

### **Atakoj kontraŭ landordo**

Grandbienulo *Antonín Švehla* [antonji:n ŝvehla] atakis landordon en la jaro 1919. Landordon subtenis Popola partio (kristanaj demokratoj subgvide *Jan Šrámek* [ŝra:mek]) kaj Nacia demokrata partio. Distrikta leĝo numero 126 de la 29-an de februaro 1920 menacis dividi teritoriojn de Moravio kaj Silezio. Rezulto estus kvin distriktoj: distriktoj de *Jihlava*, *Brno*, *Olomouc* [olomoŭc], *Hradiště* [hradjiŝtje] kaj *Opava*. Sed dank'al Popola Partio tiu leĝo neniam estis akceptita en Moravio, sed nur en Slovakio en la jaro 1923. Lasta landa prezidento, *Jaroslav Mezník* [meznji:k] (nask. en la jaro 1884 en *Křižanov* [kriĵijanov]) estis mortigita en nacista malliberejo en *Brno* en la jaro 1941.

### **Postmilita optimismo (1945)**

Germana okupacio kunigis ĉiujn slavajn naciojn de ŝtato. En la jaro 1945 civitanoj de Moravia-Silezia Lando volis esti egalrajta parto de postmilita Ĉeĥoslovakio. Moravianoj kaj silezianoj estis optimistaj kaj klopodis havi bonajn rilatojn al ĉeĥoj. Estis fonditaj organizacioj kiel Ĉeĥa Speleologa Klubo por Moravia-Silezia Lando (*Český speleologický klub pro Zemi moravskoslezskou*), Ĉeĥa Aŭtomotoklubo de Moravio kaj Silezio (*Český automotoklub Moravy a Slezska*), Bloko de Vidartistoj en Moravia-Silezia Lando (*Blok výtvarníků v Zemi moravskoslezské*) kaj Klubo de Amikoj de Artoj – Moravia-Silezia Centro (*Klub přátel umění – Moravskoslezské ústředí*).

### **Malbona politiko de praganoj**

Sed postmilita moravia optimismo rapide malaperis post malbonaj intervenoj de pragaj burokratoj. Ekzemple, en *Brno* estis centro de ŝaflana industrio. Praganoj volis ekspertan laborgrupon translokigi en Pragon. Tial Landa Nacia Komitato por Moravia Silezia Lando (*Zemský národní výbor pro Zemi moravskoslezskou*) protestis. Komunistoj komencis subteni Silezion, por ke disrompu Moravian-Silezian Landon, sed nesukcese. Landa Nacia Komitato por Moravia Silezia Lando protestis kontraŭ centralismo de praganoj kaj maljusteco dum distribuo. Profesoro *František Loubal* [frantjiŝek loŭbal], prezidanto de la Komitato, la 27-an de novembro 1945 diris: „Prago disponas kun karbo el *Ostrava* kaj nia ligno, la karbon kaj lignon oni transportas en Bohemion, sed Moravio el Bohemio reciproke neniujn karbon kaj lignon ricevas.“ - Alia citato de profesoro *Loubal*: „De oficiala raporto de interkonsiliĝo pri karbo ni ekzemple eksciis, ke elspezoj de hejma hejtajo estos en Bohemio kovritaj de 30 procentoj, sed en Moravio nur de 20 procentoj. Mi vane demandas kial? Ĉu tial, ke ni estas pli harditaj kontraŭ malvarmo?“ - Malbona kaj maljusta politiko de Prago kaj Bohemio dividis postmilitan konkordojn de ĉeĥoj kaj moravianoj kaj de ĉeĥoj kaj silezianoj.

### **Komunistoj abolicis landordon**

Jam la 28-an de marto 1946 *Klement Gottwald* [gotvald], prezidanto de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, okaze la 8-a kongreso de tiu partio proklamis, ke komunistoj volas anstataŭi landordon de distrikta ordo. Paradokse *Gottwald* mem devenis el Moravio. (Li naskiĝis en vilaĝo *Dědice* apud *Výškov* en suda Moravio)

Unusola politika partio, kiu defendis landordon, estis denove Ĉeĥoslovaka Popola Partio (kristanaj demokratoj). Antaŭ elektoj en la jaro 1946 membroj de Popola Partio agitis: „MORAVIANOJ AL MORAVIO! Ĉu vi volas konservi landordon? Ĉu vi volas, ke *Brno* restus ĉefurbo de Moravia-Silezia Lando? ... Nur Ĉeĥoslovaka Popola Partio stariĝos kontraŭ distrikta ordo! Nur Ĉeĥoslovaka Popola Partio volas konservi landajn aŭtonomiojn kaj landajn partojn.“ Tial komunistoj en la jaro 1948 kruele ekpersekutis Popolan Partion kaj preparis likvidadon de landordo. Nova (socialista) konstitucio de la 9-an de majo 1948 jam enhavis vortojn pri distrikta ordo. En novembro de la jaro 1948 estis futuraj estroj de distriktaj komitatoj rapide preparita en Centra Politika Lernejo de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio.

La 1-an de januaro 1949 Moravio kaj Silezio post iliaj miljaraj ekzistadoj malaperis el mapo de Eŭropo. Anstataŭis ilin sensencaj administraj bastardoj nomataj distriktoj kun distriktaj ĉefurboj: *Jihlava*, *Brno*, *Gottwaldov* [gotvaldov] (antaŭmilita kaj nuntempa *Zlín* [zli:n]), *Olomouc* kaj *Ostrava*. Distrikta ordo ne respektis historiajn limojn de Bohemio, Moravio kaj Silezio. Komunistoj argumentis, ke ili batalas kontraŭ burokratio, ke homoj proksimiĝos al centroj. Sed jam post kelkaj jaroj ili eksciis, ke burokratio estis pli granda ol administraro de eksa landordono. Tial en la jaro 1960 (dum erao de prezidento *Antonín Novotný* [antonji:n novotni:]) komunistoj devis krei anstataŭ kvin distriktoj nur du distriktojn: Nordmoravian kaj Sudmoravian Distriktojn kun distriktaj ĉefurboj *Ostrava* kaj *Brno*.

### **Socialista propagando**

Komunistoj ŝatis moravian vinon, abrikotojn kaj folkloron, kiun ili uzadis por sia propagando. Sed ili preferis nur moravian slovakon folkloron. Folkloron de *Haná* [hana:] ili konsideris reakcia, reprezentanta kulakan vivstilon, kaj ne ŝatis ĝin. Folkloroj de Valaĥio, Horakio aŭ Silezio ankaŭ ne plaĉis al ili.

Komunistoj subtenis arĥeologion, sed nur por ke uzadu rezultojn de arĥeologiaj esploroj por kontraŭgermana propagando.

### **Sukcesoj de arĥeologoj**

En la jaro 1949 moravia arĥeologo *Vilém Hrubý* [vile:m hrubi:] (1912 – 1985) malkovris signifajn slavajn preĝejojn kaj multe da tomboj precipe en *Staré Město* [stare: mnjesto] apud *Uherské Hradiště* [uherske: hradjištje] en sudorienta Moravio. Li kreis, ke sub nuntempa *Staré Město* estas kaŝita antikva centro de Granda Moravio. Multe da homoj denove ekinteresiĝis pri moravia historio, pri historio de Granda Moravio.

Moravia princo *Rostislav* (846 – 870) invitis bizancajn misiistojn en Grandan Moravion. En la jaro 863 sanktaj *Konstantin* (monaĥanome Cirilo) (827 – 869) kaj *Metodeo* (+ 885) alvenis, slavigis liturgiajn tekstojn kaj Evangelion, baptigis moravianojn kaj edukadis indiĝenajn (moraviajn) pastrojn. Ili kreis alfabeton kaj tradukis liturgiajn tekstojn por uzado de niaj antaŭuloj, moravianoj de Granda Moravio. Tial moravianoj povis jam en la 9-a jarcento preni Vorton de la Sinjoro en antikva slava lingvo, kiun ili bone komprenis. Nomo de la nova alfabeto estis „*Hlaholice*“ (vorto „*hlahol*“ havis du signifojn: 1. lingvo, 2. popolo).

Komunistoj prezentis Grandan Moravion ne kiel moravia ŝtato, sed nur kiel la unua komuna ŝtato de ĉeĥoj kaj slovakoj.

Arĥeologiaj esploroj apud *Staré Město*, *Valy* [vali] apud *Mikulčice* [mikulčice] kaj *Pohansko* donis interesajn rezultojn. La 16-an de aŭgusto 1963 okazis grandega ekspozicio „Granda Moravio“ en Domo de Vidartoj en *Brno*. Ankaŭ tiu ekspozicio interpretis Grandan Moravion komunistamaniere kiel „la unua komuna ŝtato de ĉeĥoj kaj slovakoj“, sed moraviana patriotismo dank'al tiu ekspozicio revivis.

## Protestoj kontraŭ diskriminado kaj postuloj de moravianj kaj silezianoj

La 2-an de aprilo 1968 okaze la 150-a datreveno de Moravia Muzeo en *Brno* proklamis sciencistoj, kiuj postulis renovigon de Moravio. Post du tagoj, la 4-an de aprilo, verkistoj kaj poetoj de *Brno* (ekz. *Jaromír Tomeček* [jaromi:r tomeček], *Oldřich Mikulášek* [oldrjĥ mikula:šek], *Alena Bernášková* [berna:škova:], *Jan Skácel* [ska:cel], *Vladimír Pazourek* [vladimi:r pazoŭrek], *Josef Věromír* [vjeromi:r] *Pleva*, *Milan Uhde*) protestis kontraŭ diskriminado de Moravio kaj volis landordon. Eĉ kelkaj komunistoj subtenis ideon de landordo. La 20-an de majo 1968 estis en *Brno* fondita Societo por Moravio kaj Silezio (*Společnost pro Moravu a Slezsko*). Proparolanto estis psiĥologo, profesoro *Boleslav Bárta* [ba:rta]. En aŭgusto 1968 tiu societo havis jam 200 000 membrojn kaj pli ol 600 lokajn komitatojn. La societo rezidis en strato *Koblišná* [kobiĵna:] (tiam *Gagarinova*) en *Brno*. En komenco de la jaro 1969 la societo eldonis ĵurnalon „*M-týden*“ (M-semajno = Moravia semajno). Pragaj politikistoj moravianojn ne subtenis. La societo volis federalan ordon kun egalaj rajtoj por Bohemio, Moravio, Silezio kaj Slovakio. Praganoj tiun ideon rifuzis. Komunistoj en Bohemio kune kun komunistoj de Slovakio volis nun ŝtaton de ĉeĥoj kaj slovakoj, pri Moravio kaj Silezio ili ne volis aŭdi. En la jaro 1969 finiĝis ĉiuj moraviaj esperoj.

## Neniigado de Moravio kaj Silezio

Neniigado de Moravio kaj Silezio kontinuus. Komunistoj evoluigis pezindustrion, precipe en *Ostrava*, kaj likvidis malpezan industrion, precipe teksindustrion. Aŭtomobila fabriko *Tatra* stagnis. Ĝi eĉ nuntempe fabrikas nur ŝarĝaŭtomobilojn. Personajn aŭtomobilojn fabrikas nur en Moravio ne *Tatra*, sed korea fabriko. Filmindustrio de *Zlín* (*Gottwaldov*), kie laboris mondfamaj gereĝisoroj *Karel Zeman* kaj *Hermína Týrlová* [tir:lova:] estis oficiale admirita, sed neoficiale likvidita.

Komunistoj ankaŭ faris eksperimentojn en Moravio. Agrokultura kooperativo *Slušovice* [sluŝovice] neniam frue distingis de aliaj orientmoraviaj kooperativoj, kiuj ne prosperis. Sed komunistoj subtenegis tiun kooperativon kaj protektis ĝin. Ĉirkaŭajaj kooperativoj preskaŭ bankrotis, sed *Slušovice* fariĝis la plej prospera kooperativo de socialista Ĉeĥoslovakio. Alian eksperimenton faris komunisto sekretario *Miroslav Mamula*, kiu ordonis mini karbon en Protektita Landa Teritorio *Beskydy* [beskidi]. En la jaro 1981 karbona minejo *Frenštát* [frenŝta:t] estis en montaro *Beskydy* konstruita, sed la karbo tie estas tre profunde kaj tial en tiu minejo oni neniam eklaboris. Dum socialismo kaj post la Velura Revolucio (1989) Moravio perdis propran fabrikadon de ŝuoj kaj vestaĵo.

## Signifo de religio

Moravianoj estis malgravigitaj, ĉar laŭ opinioj de kelkaj ĉeĥoj ili estis nur ekzotoj (preskaŭ primitivoj) el ĉeĥaj filmaj komedioj. Se iu ĉeĥa reĝisoro bezonis komikan posteniĝon por sia komedio, li preskaŭ ĉiam sukcese uzadis aŭ romkatolikan pastron aŭ iun moravianon. Moravio kaj Silezio estis kaj estas landoj, kie estas pli kredantoj ol en Bohemio. Dum socialismo moravianoj faris pilgrimadojn en *Velehrad* (proksime *Staré Město*). Ili bone sciis, ke tie estis centro de Granda Moravio. Kulto de sanktuloj *Konstantin* kaj Metodeo neniam estis elradikigita. Kiam socialista ministro de kulturo volis paroladi dum pilgrimaĝo en *Velehrad*, katolikaj pilgrimantoj silentis kaj respektis lin. Sed kiam li diris, ke „...*Velehrad* estas kultura monumento ...“, centoj da pilgrimantoj en tiu momento ekfajfis. Timiĝita ministro (komunisto, ateisto) rapide fugis en sian aŭtomobilon, revenis en Pragon al komunisto prezidento *Gustáv Husák* [gusta:v husa:k] kaj neniam plu vizitis Moravion. Socialistaj policioj *VB* kaj *StB* ofte malfaciligis veturadon al *Velehrad*, spionis tie, kontrolis pastrojn kaj fotografis pilgrimantojn, sed fieraj moravianoj ĉiam sciis, kie estas koro de Moravio.

Ne nur tradicio de Granda Moravio, sed ankaŭ tradicio de vilaĝo *Kralice*, kie en la 16-a jarcento estis eldonita fama Biblio subtenis nacian konscion de moravianoj.

Moraviana poeto *Zdeněk Rotrekl* [zdenjek] verkis artikolon „Ekzistado de Moravio en Mezeŭropo“ (*Existence Moravy ve střední Evropě*), kiu estis publikita en samizdata ĵurnalo

„Mezeŭropo“ (*Střední Evropa*) en la jaro 1988. Li akuzis komunistojn, ke ili volas disrompi kaj likvidi Moravion.

## Post Velura Revolucio

Dum Velura Revolucio en novembro de la jaro 1989 moravianoj subgvide *Boleslav Bárta* [ba:rtá] marŝis sur Karola Ponto en Prago kun sloganrubando: „NI NE ESTAS ĈEĤOJ!“

Moravio kaj Silezio denove reviviĝis. En decembro 1989 estis fondita Moravia Civitana Movado (*Moravské občanské hnutí*) subgvide *Miroslav Richter* [ri:ht̩r]. Dum socialismo *Richter* gvidis nepolitikan religian organizadon nomitan „Kunfrataro de *Gorazd*“ (*Gorazdovo bratrstvo*). La 10-an de februaro 1990 okazis kunveno en Halo *Rondo* en *Brno*, kie *Miroslav Richter* diris: „Lando, de kiu oni dudek jarojn nur forprenis, nomiĝas kolonio. Lando, de kiu oni forprenis kvardek jarojn, nomiĝas Moravio.“ La Movado ne kunlaboris kun Societo por Moravio kaj Silezio. *Richter* kaj *Bárta* estis diversaj politikistoj. *Richter* estas pli radikala kaj akcentis moravian nacion, *Bárta* akcentis landordon. Tial dum parlamentaj elektoj Moraviana Civitana Movado, kiu kandidis kune kun Ĉeĥoslovaka Popola Partio ne sukcesis. En Parlamento estis sukcesa partio Movado por Aŭtonoma Demokracio-Societo por Moravio kaj Silezio, kiu sukcesis ankaŭ dum la duaj elektoj. En la jaro 1991 mortis dum intertraktadoj en *Budmerice* (en Slovakio) *Boleslav Bárta*. (**Bildo 2**) Post lia morto ekgvidis la Societon *Jan Kryčér* [kri:čer], sed li ne konservis politikon de la Societo, faris propran politikan eksperimenton nomatan Bohemia-Moravia Unio de Centro (*Českomoravská unie středu*) kaj perdis ĉion. Pli sukcesa estis Moravia Nacia Partio (*Moravská národní strana*), kiu estis fondita la 7-an de aŭgusto 1990. Ĝia unua prezidanto estis *Milan Škočovský* [sko:čovski:], nuntempe estas prezidanto *Ivan Dřímál* [dri:mal]. Afiŝo de tiu partio diras: „Ne dividi ŝtaton, sed juste ĉion distribui“. Moravianoj kaj silezianoj ne volas disrompi Ĉeĥan Respublikon, por ke kreu tri liliputajn ŝtatojn. Sed malamikoj, kiuj akuzas ilin de tiu intenco eĉ kreis mallaŭdon vorton „moravisto“, kiun signifas „moraviana fanatiko“.

Jam en la jaro 1990 Moravia Muzeo (*Moravské muzeum*) revenis al sia origina nomo Moravia Landa Muzeo (*Moravské zemské muzeum*). Ŝtata Regiona Arĥivo *Brno* (*Státní oblastní archiv Brno*) revenis al sia origina nomo Moravia Landa Arĥivo (*Moravský zemský archiv*).

Neniu postvelura registraro volis aŭtonomion de Moravio kaj Silezio. Nuntempa landordo estas distrikta. Registraro ripetis erarojn de komunistoj. Nuntempaj distriktoj tute ignoras historiajn limojn de Moravio kaj Silezio. Hibrida Moravia-Silezia regiono fakte enhavas nur du partojn de Moravio kaj Silezio. Same hibrida Distrikto de *Olomouc*. Moraviana regiono *Dačice* [da:ci:ce] estis aligita al Sudbohemia Distrikto. Moraviaj urboj *Svitavy* [svitavi] kaj (eĉ!) *Moravská Třebová* [moravska: tr̩jebova:] (Moravia *Třebová*) estis aligitaj al Bohemio. Distrikto Montetaro kaj Distrikto de *Pardubice* estas hibridaj distriktoj, kiuj enhavas partojn de Bohemio kaj Moravio. Celo estas klara: neniigi historiajn limojn de Moravio. Propagando estas sama kiel komunista propagando en la jaro 1948: registraro batalas kontraŭ burokratio, ŝparas monon kaj homoj proksimiĝos al centroj.

Nuntempe funkcias politika partio Moravianoj (*Moravané*), Moravia Nacia Komunumo (*Moravská národní obec*), Moravia Nacia Kongreso (*Moravský národní kongres*), Moravia-Silezia Akademio (*Moravskoslezská akademie*), Societo por Moravio kaj Silezio (*Společnost pro Moravu a Slezsko*), Reĝa ordeno de Moraviaj kavaliroj de sanktaj *Rostislav* kaj *Kolumbano* (*Královský řád Moravských rytířů sv. Rostislava a Kolumbana*), Granda Moravio (*Moravia magna*), Moravio ne estas Bohemio (*Morava nejsou Čechy*), Moraviaj kaj Sileziaj informejoj (*Moravské a Slezské informační centrum*), Etnografia moravio (*Národopisná Morava*). Prezidantino de Moravia Nacia Kongreso estis laboristino de asekurejo kaj verkistino *Alena Ovčáčková* [ov:ča:či:kova:] (nask. 1956). Politikaj ŝancoj de tiuj organizacioj estas nur malgrandaj. Danĝera estas kunlaboro de kelkaj politikistoj kun ekstremaj dekstruloj. Belaj moraviaj flagoj flirtis la 1-an de majo 2011 ankaŭ super bone razitaj kapoj de razkapuloj! Moraviaj kaj sileziaj organizacioj ne havas eminentulojn kun politika influo kaj mono.

Ĉeĥigado kaj angligado de Moravio kaj Silezio estas kunligita kun kulto de antaŭmoravia kelta historio, ĉar regantaj liberaloj pli bone akceptas tradiciojn de paganaj keltoj ol kristanaj moravianoj.

Sed en la jaro 2011 nombro de homoj, kiuj konfesis moravian nacion estis pli granda ol en la jaro 2001. En la jaro 2001 proklamis moravian naciecon 3.8 % el 10 230 062 civitanoj de Ĉeĥa Respubliko kaj en la jaro 2011 jam 6.7 % el 10 562 214 civitanoj.

Tio signifas, ke moravianoj vivas kaj povas batali por landordo, pli bona futuro de sia lando, kiu neestante estas. (**Bildo 3**)

### **Referencoj**

- HORA, P. (1993): Toulky Českou minulostí. Vol. 3. 1-a eld., Praha, Baronet, 239 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. (1993): Toulky Českou minulostí. Vol. 1. 2-a eld., Praha, Bonus Press, 277 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. (1995): Toulky Českou minulostí. Vol. 2. 2-a eld., Praha, Bonus Press, 454 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. (1995): Toulky Českou minulostí. Vol. 4. 1-a eld., Praha, Baronet, 239 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. (1996): Toulky Českou minulostí. Vol. 5. 1-a eld., Praha, Baronet kaj Via Facti, 230 paĝoj.
- JANEČEK, P. (2005): Ostravsko-český slovník zejména pro Čechy obyvatele, nejvíce pak pro města hlavního obyvatele, ku pochopení lepšímu dělného lidu prostého. 1-a eld., Ostrava, Repronis, 80 paĝoj.
- KNOZ, T. (2008): Karel Starší ze Žerotína – Don Quijote v labyrintu světa. 1-a eld., Praha, Vyšehrad, 368 paĝoj.
- OVČAČIKOVÁ, A. (2001): Staré pověsti moravské. 1-a eld., Olomouc, Poznání, 181 paĝoj.
- OVČAČIKOVÁ, A. (2003): Pověsti velkomoravské. 1-a eld., Olomouc, Poznání, 219 paĝoj.
- PERNES, J. (1996): Pod moravskou orlicí aneb Dějiny moravanství. 1-a eld., Brno, Barrister & Principal, 285 paĝoj.

**Moraviana slovak kapelo (*Uherské Hradiště*, la 7-an de aprilo 2012)**





**Tombo de Boleslav Bárta (1929 Rozhraní – 1991 Budmerice)**



Moraviaj slovakaj knabinoj en *Uherské Hradiště*,  
la 7-an de aprilo 2012

